katolika sento

7 JARO 54a U.E.C.I.



KATOLIKA SENTO
BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)

Anno 54° - 1975

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI
AŬ PASTRO DUILIO MAGNANI
VIALE C. ZAVAGLI 73
RIMINI

Quota di abbonamento L. **2500**

Abonkotizo italliroj **2500**

KATOLIKA SENTO
nº 7
54a Jaro Julio 1975

LA MISIO DE LA PASTRECO EN LA NUNTEMPA MONDO

(Homilio de la Sankta Patro dum la celebrado okaze de la 12a datreveno de lia kronado)

Fratoj kaj Filoj!

La ceremonio de la granda ordinado, kiun ni estas celebrantaj, ne konsentas al ni la tempon necesan por adekvata homilio, kiu en la ceremonio mem havus tiom da aferoj komentariendaj kaj prezentendaj al via meditado, kiaj la pentekosta konsisto de ĉi tiu asembleo de Diakonoj, ĝis nun neniam egaligita, la hodiaŭa festo de la sanktaj apostoloj Petro kaj Paŭlo; la okazo, nome la nuna eksterordinara jubilea celebrado; la liturgiaj tekstoj; la loko, konsekrita al la historio, al la arto, al la kulto; la personoj, la sentoj, la sindevigoj, vigligantaj ĉi tiun memorindan riton, estas ĉiuj aferoj, ni opinias, kiuj parolas per si mem, kaj kiuj, stampitaj en via memoro, estos inspirantoj de altaj kaj neelĉerpeblaj pensoj.

Sed ni ne povas prisilenti tri vortojn, kiuj koncentras en si la intiman veron de la mistero de la pastra ordinado, kaj kiun ni simple proponas al via memoro kiel ĉapitrojn, kiujn vi mem, laŭlonge de via vivo, devos daŭre memori kaj esplori.

La unua vorto, vi ja scias, estas "vokiĝo". Vi estis vokitaj. Vokitaj de Dio, vokitaj de Kristo, vokitaj de la Eklezio. Kia ajn estas la maniero laŭ kiu la vokiĝo resonis en la interna profundo de via konscienco kaj en la

ekstera realo de via sperto, ĉiu el vi devos ĉiam memo ri pri ĉi tiu fakto, kiu kvalifikas vian ekziston: la dia elekto direktita al via persono. Vorto de Jesuo, kiu el la evangelio descendis ĝis via homa ekzisto: "Mi elektis vin" (Jo.15,16); al ĉiu el vi Kristo diris: "venu, sekvu min" (Mt.19,21); kaj por vi ĉiuj la sama voĉo resonis dolĉa, liberiga kaj ordona: "venu kaj sekvu min: Mi igos vin kaptistoj de homoj" (Mt.4,19).

Ho, feliĉaj vi, filoj kaj fratoj tre karaj! feliĉaj vi, kiuj havis la gracon, la saĝon kaj la kuraĝon aŭskulti kaj akcepti ĉi tiun determinan inviton! Ĝi skuis la normalajn kaj allogajn projektojn de via vivo; ĝi fortiris vin el la societo de viaj karuloj (Mt.19,27-29); ĝi petis de vi eĉ rezignon pri la geedza amo por ekzalti en vi esceptan plenecon de amo al la ĉiela regno; nome, al la kredo, kaj al la karitato al la fratoj (Mt.19,12); ĝi faris el vi apartajn estaĵojn, pli similajn - pro la pastra karaktero - al la anĝeloj ol al la homoj de ĉi tiu mondo (vd.Mt.22,30; 1 Kor.7,8); ĝi enverŝis en vin, kaj ankaŭ trudis al vi spiritecon ekskluzivan (vd.Gal.5,16), kiu tamen ĉion kapablas kompreni kaj taksi (vd. 1 Kor. 2,14. Jo.14,17); kaj akceptante vian oferon, vin enigis en la draman aventuron de la sekvantaro de Kristo (vd. Mt.8,19; Lk.22,35). Ho, feliĉaj vi! pripensu ĉiam la eksterordinaran bonŝancon de via vokiĝo, kaj neniam dubu esti erarintaj vian elekton inspiritan de supera graco, de saĝo kaj karitato (vd.Mt.19,11; 1 Kor.12,4). Kaj ne plu returniĝu! Tion instruas al vi Jesuo mem: "Kiu ajn, metinte sian manon al la plugilo, rigardas malantaŭen, ne taŭgas por la regno de Dio" (Lk.9,62). Ĉi tiu estas la leĝo de la vokiĝo: jes totala kaj definitiva.

Poste estas dua vorto, tute dia. Kiel ni nomu ĝin? Laŭ la kanona juro ĝi nomiĝas pastra ordinado. Sed kion signifas, kion sekvigas la pastra ordinado? Kia estas la efiko de la sakramenta agado, konsistiganta la e

sencon, la veron, la supernaturan novecon de la nuna rito? Ni atentu! Ĉi tie staras la fokusa punkto ne nur de ĉi tiu ceremonio, sed de la mistero de la Eklezio. Temas pri la transdono de spiritaj povoj, kiujn la Sankta Spirito enverŝas en la elektitan disĉiplon, suprenlevitan al la rango de servisto de Dio, por Kristo, en la Eklezio. Memoru pri Kristo reviviĝinta, parolanta al siaj disĉiploj kaj blovanta super ilin: "ricevu la Sanktan Spiriton!" (Jo.20,22). Iu kontakto, iu impreso, iu karaktero modlis tiam kaj modlas ankaŭ nun tiun, kiu ricevas la ordinan sakramenton; li iĝas kapabla "disdoni la misterojn de Dio" (1 Kor. 4,1; 1 Pet. 4,10). Ni neniam forgesu, fratoj kaj filoj, ĉi tiun specialan rilaton, kiun la pastra ordinado starigas inter ni kaj Dio: ni iĝas vehiklo de la dia ago. "La ordino, diras S. Tomaso, kunportas precipe la donon de iu potenco", kiu per si mem transcendas la homan eblecon, kaj kiu nur de Dio povas deveni kaj esti konfidita al la homo. Pensu pri la povo konsekri, oferdoni, administri la Korpon kaj la Sangon de Li, nia Savanto, kaj pardoni aŭ reteni la pekojn"! Se tiel estas, kaj estas tiel, la miro ne plu povos malaperi en niaj spiritoj; ni devos esti ensorbitaj en la kontemplado de la mistero de nia ordinado Nia tuta vivo ne sufiĉos por tute plenumi la meditadon pri la neelĉerpebla riĉeco de la grandaj aĵoj faritaj de la potenco kaj de la boneco de Dio.

Vokiĝo, ordinado! Kaj jen la tria vorto, en kiu resumiĝas la celebrado, kiun ni estas plenumantaj; tiu vorto estas: misio! Ni tion scias bone, sed nun ni lasas, ke nin tute trapenetru la signifo, la postulo de la katolika pastreco. Por tiu, al kiu ĝi estas donita, la pastreco ne estas digno nur persona. Ĝi estas servo, ĝi estas perado inter Dio kaj la popolo. La pastreco estas destinita al la Eklezio, al la komunumo, al la fratoj; ĝi estas destinita al la mondo. Ankaŭ tiurilate la paro-

HO ASTRO PLEJLUMA

al S. Francisko

P. M. Galletti OFM.

Andantino

Ho as - tro plej - lu - ma I - ta - la del'

te - ro, Fran - ci - sko, ni ĝo - je al vi kun e-

allarg.

spe - ro ri - gar - das, pro - kla - mas Pa - tro - no ĉe

Di'. El ĉi - - uj po - po - loj re-

so - nu la kan - to, him - na - du laŭt-

vo - ĉe al vi bon - fa - ran - to, le-

vi - ĝu kon - kor - de la dan - ko de l' kor, le-

smorz. allarg.

vi - ĝu kon - kor - de la dan - ko de l' kor.

lo de Kristo havas konstitucian valoron: "Paco al vi!" li diras al la apostoloj la vesperon mem de sia revivi - ĝo. "Kiel la Patro sendis min, tiel mi sendas vin" (Jo. 20,21). La pastreco estas apostola. La pastreco estas misia. La pastreco estas praktikado de perado. La pastreco estas esence socia. Kaj jen, kvazaŭ por skui nin el la ebrieco, kiun la sakramenta mistero naskis en ni, alvenas ĉi tiu programa kaj renversa ordono: "Iru kaj portu la Evangelion al ĉiuj gentoj" (vd. Mt. 28,19).

Ankaŭ tiurilate daŭra kaj progresa ago de konsciencco devos partopreni en la pastra spiriteco. Ĉiu el vi devos ripeti al si mem: mi estas destinita por servi la Eklezion, por servi la popolon. La pastreco estas karitato. Ve al tiu, kiu pensus fari el ĝi utilan egoismon. La totala donaco de sia vivo malfermas antaŭ la malavara pastro novan mirindaĵon: ĝi estas la panoramo de la homaro. Verŝajne, kiam li rimarkis, ke li estas disigita, pro sia vokiĝo, disde la propra socia medio, kaj destinita al aktiveco tute speciala, li dubis, ke li neniam plu povos havi rektajn kontaktojn kun la nuntempa socio, aŭ kun ĝiaj unuopaj elementoj. Sed li devas nun aggnoski, ke li eraris. Se ekzistas servo postulanta, ke tiu, kiu ĝin plenumas, mergiĝu en la multforman sperton de la socio, eĉ pli ol instruisto, ol kuracisto, ol politikisto, tiu estas la servo de la pastra ofico. "Vi estas, diras la Sinjoro, la salo de la tero, vi estas la lumo de la mondo" (vd. Mt. 5,13-15). Iu simileco, iu simpatio, iu neceso, kunligita kun la pastreco, devigas la servanton de la Parolo, de la Graco, de la Karitato, ne nur sin disponigi por ĉiu dialogo, por ĉiu invito al li adresita, sed ankaŭ preni li mem iniciaton serĉi tiun, kiu, vole aŭ nevole, bezonas lin. Ĉi tiu teniĝo aktiva kaj apostola devas, hodiaŭ pli ol iam, elstari en la figuro de la Pastro: karitato klare supernatura, sentema kaj zorgema, devas karakterizi lian oficon, precipe

por la efika starigo de la socia justeco, laŭ la spirito kaj la formoj de la kristana sociologio, kiu devas ĉerpi sian inspiron kaj sian energion el la Evangelio kaj el la Eklezio kaj ne el aliaj fontoj malproksimaj de la kristanaj principoj: "la karitato de Kristo nin pelas"(2 Kor. 5,14), kaj neniu alia stimulilo povas ĝin anstataŭi kaj superi. "Levu viajn okulojn" ni diros al vi per la vortoj mem de Kristo "kaj rigardu la kampojn, kiuj jam flavas por la rikolto" (Jo.4,35). Ni kuraĝos profete indiki la apostolan panoramon starantan antaŭ ĉiu el vi: la mondo bezonas vin! la mondo vin atendas! eĉ en la malamika krio, kiun iufoje ĝi ĵetas kontraŭ vin, la mondo montras sian soifon de vero, de justeco, de renovigo, kiun nur via ofico povos kontentigi. Sciu akcepti kiel inviton la riproĉon mem, kiun verŝajne, kaj ofte maljuste, la mondo ĵetas kontraŭ la heroldon de la Evangelio! Sciu aŭskulti la ĝemon de la mizerulo, la voĉon de la infano, la penseman krion de la junularo, la lamenton de la laboristo laca, la sopiron de la suferanto kaj la kritikon de la pensulo! Neniam timu! ripetis la Sinjoro. La Sinjoro estas kun vi (vd. Mt. 28,20). Kaj la Eklezio, patrino kaj instruistino, vin asistas kaj vin amas, kaj atendas, pere de via fideleco kaj de via aktiveco, ke Kristo daŭrigu sian konstruan agadon de savo.

Kaj ni finas honorante la apostolon Petro, kies feston ni celebras hodiaŭ, ĉi tie, apud lia glora tombo, igante nia lian pastran admonon.

"Mi do admonas vin, Presbiteroj, Mi, kiu estas kunpresbitero kaj atestanto de la suferoj de Kristo, kaj vokita al partopreno en tiu gloro, kiu iam estos aperigita: estu paŝtistoj de la grego de Dio, kiu de vi dependas, ĝin regante ne perforte, sed per boneco, kiel volas Dio; ne pro amo de fia gajno, sed kun bonvola animo, kaj ne kiel superregantoj de la heredaĵo de la Si-

njoro, sed fariĝinte sincere modeloj de la grego. Kaj kiam la Princo de la Paŝtistoj aperos, vi ricevos la ne korupteblan glorkronon" (I Pet. 5,1-4). Amen.

tr. C.M-P.M.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ALIĜIS AL LA 36a IKUE-KONGRESO EN ROMO

295 Kosiaty Maria
296 Ferrari Carlo Cesare
297 Klimowicz Sygmund
298 Zeballos-M. Romulo
299 Georget Alice
300 Kłej Tadeusz
301 Smits Simon
302 Teleky Deziderio
303 De la Fuente de P.M.
304 Piquero Marina
X305 Giacchino T. Serenella
306 Barasevich Antonio

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

PREĜO POR LA JUBILEO-KONGRESO

En ĉi tiu jaro de via granda pardono, ho Dio, jen ankaŭ ni, Katolikaj Esperantistoj, aŭdis vian aman inviton. Kaj tuj ĝoje ni akceptis tion, konsiderante, ke estas signo de via favoro, ke ni povis venki malfacilaĵojn, kiujn aliaj ne sukcesis superi. Kun amaso da pilgrimantoj ni ankaŭ venis al vi; sed ni spertas kiel privilegion ke, kvankam ni apartenas al diversaj nacioj, al ni eblas kuniĝi per la sama lingvo Esperanto, kiel fratoj de unika familio en ama interkompreno, laŭ via deziro.

Ni kune agnoskas kun humilo kaj pento, ke ni estis pekuloj, sed de nun ni promesas esti observantoj de via vorto laŭ la instruoj de Kristo kaj de nia Eklezio.

Kruco kaj Stelo estos vivanta insigno de nia kristana vivo kaj de nia esperanta idealo, reciproke akcelante nian kredon je vi kaj niajn amajn rilatojn kun la fratoj.

Kaj nun degnu beni, ho Sinjoro, vian esperantistan familion, kongrese en via nomo kuniĝintan! Amen.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

La Roma Grupo de UECI informis pri nia Kongreso la Romanojn per afiŝoj kaj flugfolioj. Jen ilia enhavo:

U. E. C. I.
UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI ITALIANI
GRUPPO DI ROMA

CATTOLICI ROMANI

Dall' 11 al 16 agosto si terrà a Roma presso la Domus Pacis il 36° CONGRESSO DELL'UNIONE INTERNAZIONALE DEGLI ESPERANTISTI CATTOLICI (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) che conta aderenti in molti paesi di ogni parte del mondo, comprese diverse associazioni nazionali, come l'Unione Esperantisti Cattolici Italiani.

I partecipanti al Congresso, che si esprimeranno nella comune lingua internazionale ESPERANTO provengono principalmente da: Austria - Belgio - Cecoslovacchia - Germania - Francia - Gran Bretagna - Italia - Jugoslavia - Norvegia - Olanda - Polonia - Romania - Spagna - Ungheria - Uruguaj - U.S.A.

I cattolici esperantisti intendono sottolineare, in occasione dell'Anno Santo, la necessità di una lingua ausiliaria internazionale che favorisca la comprensione tra i popoli nello spirito di fratellanza universale e contribuisca alla diffusione ed alla difesa della Fede Cattolica.

Questa lingua può essere solo l' ESPERANTO che, a differenza delle lingue nazionali, per la sua caratteristica di neutralità garantisce il rispetto dei diritti e degli interessi di tutti i popoli.

Nel programma del Congresso è prevista la celebrazione di una Messa solenne per la PACE nel mondo.

Il Rito verrà concelebrato in lingua esperanto da officianti di diverse nazionalità MERCOLEDÌ 13 AGOSTO alle ore 18 nella Basilica di SANTA MARIA MAGGIORE.

I CATTOLICI ROMANI SONO INVITATI AD INTERVENIRE.

IL GRUPPO DI ROMA DELL'U.E.C.I.

(per informazioni rivolgersi a:

Padre Giacinto Jacobitti
Piazza S.Maria Maggiore, 8
Roma - Tel. 73.85.15)-

ĈAR ESTAS BONA ŜANCO, okaze de Jubileo, ricevi pekabsolvon pere de esperantistaj konfesprenantoj, ni volas doni la plej uzeblajn formulojn por ĉi tiu sakramento:

(S. = sacerdoto; K. = konfesanto)

S.K. En la nomo de l'Patro kaj de l'Filo kaj de l'Sankta Spirito. Amen.

K. Benu min, patro, ĉar mi pekis.

S. La Sinjoro, kiu lumigas per la kredo niajn korojn, donu al vi veran konon de viaj pekoj kaj de la dia mizerikordo.

K. Amen.

(Oni diras la tempon de la lasta konfeso, la pekojn eventuale tiam forgesitajn, poste ĉiujn pekojn faritajn post la lasta konfeso. Oni povas konkludi tiel:)

K. Pri ĉiuj pekoj konfesitaj kaj pri tiuj, kiujn mi forgesis, mi petas de Dio pardonon, kaj de vi, spirita patro, riparsugeston kaj absolvon.

(Post la admono de la konfesprenanto kaj lia propono de ripara agado, la sacerdoto invitas la konfesinton diri pentopreĝon per ĉi tiu aŭ alia formulo:)

K. Mia Dio, per tuta mia koro mi esprimas penton kaj ĉagrenon pri miaj pekoj, ĉar ili estas ofendo de via senfina majesto, kaŭzo de la morto de via dia Filo Jesuo kaj mia spirita ruino. Mi volas estonte neniam plu peki kaj mi firme intencas eviti la okazojn. Sinjoro, kompate pardonu min.

S. Dio, Patro kompatema, kiu per la morto kaj reviviĝo de via Filo repaciĝis kun ni kaj donis al ni la Sanktan Spiriton por nia sanktigado, donu al ni, pere de la Eklezio, pardonon kaj pacon.

Kaj mi absolvas vin de viaj pekoj en la nomo de l' Patro kaj de l' Filo ✝ kaj de l' Sankta Spirito.

K. Amen.

S. Ni laŭdu la Sinjoron, ĉar li estas bona.

K. Eterna estas lia mizerikordo.

S. La Sinjoro pardonis viajn pekojn. Foriru en paco.



Iom malfacile estus hodiaŭ rekoni el ĉi tiu - por la Jubileo de 1925 - pilgrimanta verdstelano, la grandbarban monakon, ĝis nun vigle biciklantan, "Fra Girolamo", kiu gastame akceptas vizitantojn de la Trapista monakejo apud Romo!

ROMA ESPERANTA VOĈO
nº 141

PREĜO DE L' BEATA P. MAKSIMILIANO KOLBE, KAVALIRO DE LA SENMAKULA

Helpu min Panj', elteni lastajn horojn
Kaj inter mornaj muroj, sen sunbrilo,
Morti en Kristo kun konsola sento:
Almenaŭ unu hom', de l' mort' savita,
Laŭ Dia volo venos al gefiloj.

Mia malsat' je Dia am' febligu
Tiom la forton de la korpmalsato,
Ke mi al Di' turnante min sukcesu
Laŭeble longe spiti dum preĝado

La morton, kaj ĝis lasta spiro Dion
Glorlaŭdi danke pro l' favor' donita,
Ke mi super satanon Kredon mian,
Ardan kaj puran, venke levi povis,
Kiel Hostion kun la Krucumita.

Jozefo Riječanin

ELSTARA FIGURO EN LA ESPERANTISTA rondo forpasis. Revenis al Dio en Florenco je 18.6.1975 Prof. Bruno Migliorini, naskiĝinta en 1896. Kvankam de kelkaj jaroj pro familiaj kaŭzoj li malpliigis sian agadon en nia movado, en kiu li aktivis ekde 1912, li tamen restis tre ligita al la esperanta idealo, al kiu li estis doninta siajn brilajn talentojn.
Ni trovas lin jam en 1914 inter la fondintoj de la Venecia Grupo, kie li kunlaboris kun sia frato Helio, daŭre aktivanta en Romo, pri la "Grammatica italiana di Esperanto" kaj pri "Legolibro". Vic-prezidanto de la Esperanta Akademio, li prelegis en la Someraj Esperanto-Universitatoj de Oksfordo, Parizo kaj Romo. En 1935, li kunlaboris en la organizado de la U.K. en Romo. Profesoro pri Romida filologio en Friburgo, poste pri historio de la itala lingvo en Romo kaj Florenco, en la lingvistika fako li akiris internacian aŭtoritaton. Li estis redaktoro por la fakoj "lingvistiko kaj literaturo de "Enciclopedia Italiana"(estas lia la voĉo "Esperanto" en tiu monumenta enciklopedio); aŭtoro de multaj gravaj studoj, direktoro aŭ kunlaboranto de sciencaj revuoj, kaj honora prezidanto de la fama "Accademia della Crusca" (la plej prestiĝa lingva instanco en Italujo).
Al la familio en Firenze kaj aparte al lia frato prof. Helio, loĝanta en Romo, niajn plej sincerajn kondolencojn.

Memore de Prof. Bruno Migliorini, E.M. donacis al "Bonfara Kaso" £. 50.000.

FORPASIS EN ROMO je 26 de junio, la 73-jara mons. Josemaria Escrivà de Balaguer, kiu en 1928 fondis la "Opus Dei", hodiaŭ tutmondan asocion kun 60.000 membroj, sacerdotoj kaj laikoj el 80 landoj. Je 28 de mar

to li estis celebrinta sian oran jubileon pri sacerdoteco. Kaj post tri monatoj estis lia naskotago en la eterna vivo. En "Vojo", la konata esperanta eldono (el la preskaŭ cent aperintaj ĝis nun en ĉiuj lingvoj) de "Spiritaj konsideroj" de li verkitaj, je p. 232, n° 739, li skribis: "Ne timu la morton. Akceptu ĝin de nun, sindone..., kiam Dio volos ..., kiel Dio volos ... - Ne dubu: - ĝi venos en la tempo, en la loko kaj en la plej konvena maniero ..., sendita de via Patro-Dio. Estu bonvena nia fratino la morto!".
Li deziris forlasi la teron sen ĝeni iun ajn, humile, silente. Kaj Dio aŭskultis lian preĝon. En tiu tago, fermante la okulojn al la tera lumo, li malfermis ilin al la ĉiela. Li iam diris: Ĉielo kaj tero, miaj filoj, ŝajnas kuniĝi malproksime, ĉe la horizonta linio. Ne tiel estas: ili kuniĝas, fandiĝas en via koro mem ...". Kiel lia tuta vivo celis nur plenumon de la dia volo, tiel estis ankaŭ lia morto. Ofte li ripetadis, ke lia tuta vivo estis por la Eklezio kaj la Papo. "Dankon - li skribis iam en notoj pri siaj spiritaj ekzercadoj - dankon, mia Dio, por la amo al la Papo, kiun vi metis en mian koron".

El la Katolika Eklezio

UNU EL LA PLEJ SOLENAJ RITOJ en la kadro de la Sankta Jaro, estis tiu okazinta dimanĉe, 29 junio, solene de la Sankta Apostolo Petro, per la konsekrado de 359 novaj sacerdotoj. La celebro, pro la Episkopo, kiu ordinis la sacerdotojn kaj pro la nombro de la ordinitoj, neniam ĝis nun atingita en S. Petro, sin prezentis laŭ vere historia dimensio, en la 12a datreveno de la kronado de la Papo, kiel atesto de amo kaj fideleco al li flanke de la klerikaro kaj de la tuta mondo, dum ĝi espri-

mis la patran korinklinon kaj la estimon de la Papo al siaj sacerdotoj, dediĉitaj al sindona kaj luma servo de l'Eklezio.
La tre solena rito estis oportune kunligita kun la meso de la Sanktaj Apostoloj Petro kaj Paŭlo, kaj ĉi tio donis al ĝi ĝian esencan kaj romanecan kaj universalecan signifon.
Kadro de la grandioza rito estis la vasta placo Sankta Petro, brila ĉe la komenco pro bela printempa suno. Sed ĝia centro prezentis tute novan aspekton. Antaŭ la simpla altaro de la Papo la diakonoj, laŭ ok longaj vicoj (v. foton). Flanke de la altaro vastaj tribunoj por la Diplomataro kaj la invititoj, ĉefe por la 2000 familianoj de la ordinendoj, kiuj akompanis ilin dum tiel escepta evento. Interne de la Bernini-a duoncirko, la fidelula amaso ĉiam kompakta, kiu dum ĉiuj papaj celebroj plenigas ĉi tiun vastegan korton de la dia Eklezio.
Post la liturgio de la Vorto kaj la legado de la Evangelio, la Papo adresis al la elektitoj la paroladon, kiun ni prezentas en la komenco de ĉi tiu kajero. Sekvis la Sanktulara Litanio, dum kiu la blanka aro de la ordinendoj preĝis teresternite. Kiam ĝi finiĝis per la triobla alvoko, por ke estu benataj, sanktigataj, konsekrataj la kandidatoj al sacerdoteco, jen duope ili viciĝis antaŭ la Papo, kiu surmetis la manojn al ĉiuj, dum la tuta asembleo kantis kaj ripetis la himnon "Veni Creator". Samtempe la dudek kardinaloj kuncelebrantaj, la episkopoj kaj sacerdotoj komisiitaj, ripetis sur ĉiun la saman geston. Kompletigis la riton la manŝmirado, la transdono de la pateno kun la hostio kaj de la kaliko kun la vino konsekrendaj, la brakumado de la Papo al la novaj sacerdotoj kaj la aliaj konkludaj preĝoj.
Per la "Kredo" daŭris la meso ĝis la Komunio, dum kiu la Papo disdonis la Eŭkaristion al kelkcent familianoj de la novaj sacerdotoj, kiuj samtempe aliris la al-

taron por komunii. Tiel en la sama momento sacerdo - toj kaj familianoj, patroj, patrinoj kaj gefratoj kune nutriĝis per la sama vivanta Dio. Kiam la tuta longa rito finiĝis, kaj ĉiuj komencis forlasi la sanktan lokon, jam estis nokto.

INTER LA 25 ĜISNUNAJ jubileoj, la nuna ŝajnas la plej fruktoriĉa, se ni rajtas kalkuli la spiritajn fruk - tojn de la dia graco, ne perceptebla per si mem, per la ekstera signo de la vasta respondo de la kristanaro al la alvoko de la dia mizerikordo. Memorante pri la promeso de Jesuo al Petro: "Mi donos al vi la ŝlosi - lojn de la regno de la ĉielo. Tio, kion vi pardonos sur la tero, estos pardonita ankaŭ en la ĉielo...", ni konstatas, kiom ili estas veraj ankaŭ hodiaŭ, vidante la tutmondan pilgrimantaron, kiu celas la tombon de Petro. Apud ĝi, la posteulo de Petro, heredanto de la dia promeso, malfermas la senfinan trezoron de la sango de Kristo. Kaj senĉesa fluo da kredantoj pentofarante viciĝas antaŭ li. Spektaklo de la ĉiam vivanta Eklezio, kiu ekde la komenco estas persekutata kaj suferas, sed neniam pereas, spite de la homa malforteco kaj de la ĉiam proklamata anonco de ĝia fino. Ĉu ankaŭ dum nia tempo ne estas tiel? Verŝajne ni mem kelkfoje kredis aŭ almenaŭ timis pri tio. Sed ankoraŭfoje jen la plej trafa pruvo de ĝia vigleco kaj sankteco: la jubileo. Jen kelkaj el la plej gravaj manifestacioj de ĉi tiu religia, vere eksterordinara evento.

El la Latina Ameriko la plejmenciindaj grandaj pilgrimadoj estis 6 el Argentino, 9 el Meksikio; 3 el Brazilo, 2 el Bolivio. El Venezuelo ne tre grandaj, sed ĉiusemajnaj. Okaze de la Pentekosto alvenis entute pli ol mil pilgrimantoj el multaj sudamerikaj ŝtatoj. Per la "Suna Trajno" 120 malsanuloj el Munkeno kun 180 akompanantoj. 55 egiptoj, el kiuj 5 muzulmanoj kaj 20

kopto-ortodoksaj; kaj tridek el Turkujo. Grandaj pil - grimadoj el ĉiuj italaj diocezoj kaj regionoj, kun eĉ pli ol 5000 partoprenantoj. 1200 pilgrimantoj venis el Aŭstrujo, pli ol 500 el Belgujo, 200 el Danlando, 2600 el Francujo, 11.500 dum majo el Germanujo.
Ĉi tiuj estas nur kelkaj el la plej notindaj karavanoj , sed efektive ili estis multe nombraj: en la sola majamonato oni kalkulis 21 el Aŭstrujo, 48 el Francujo, 239el Germanujo! El Hispanujo, pli-malpli 100.000 estis la pilgrimintoj pere de tre multaj grupoj. Preskaŭ ĉiusemajne grupoj alvenas el Filipinoj, el sudaj kaj nordaj Amerikaj ŝtatoj, kaj el pluraj afrikaj nacioj.
Ĉiam multenombraj estis la polaj pilgrimadoj en majo kaj junio, aparte tiuj de polaj studentoj kaj de fervojistoj. Rimarkinda estis tiu de Krakovo, organizita de periferia parokejo, kies preĝejo nun konstruiĝanta estos dediĉata al Beata Maksimiliano Kolbe. Por aŭgusto estas anoncitaj aliaj pilgrimadoj el Krakovo, Lublino kaj Lodz. Komence de la monato alvenos 2000 polaj elmigrintoj en Amerikajn ŝtatojn. En septembro multenombra grupo da profesoroj el la Katolika Lublina Universitato. De 9 ĝis 15 de oktobro okazos la granda tutnacia pilgrimado kun 2500 fideluloj; kaj de 17 al 20 ankoraŭ pluraj centoj da personoj por la beatigo de Maria Tereza Ledochowska. Kaj fine, memorinda estos la pil - grimado, 17-20 oktobro, de 200 sacerdotoj, kiuj estis internigitaj en la koncentrejoj de Dachau.

BEATIGAJ PROKLAMOJ - Inter la solenaj ekleziaj proklamoj pri sankteco de kelkaj homoj, imitindaj pro sia vivo dediĉita al la servo de Dio, ni memorigas la beatiĝon de Carlo Steeb, Fondinto de la religia asocio "la Mizerikordaj Fratinoj de Verono", je 6 julio; kaj je 19 oktobro, pormisia tago, la kvaropan beatigon de P. Arnoldo Janssen, Fondinto de la Societo de la Dia Vorto;

de Jozefo Freinademetz, misiista sacerdoto de la sama societo de la Dia Vorto; de Karlo Jozefo Eugen de Mazenod, Episkopo de Marsilio kaj Fondinto de la religia societo: "Oblati" (Dediĉitaj)de la Senmakula Virgulino kaj de la pola Maria Teresa Ledokowska, Fondintino de la Pia Societo Sankta Petro Klaver. Ŝiaj relikvoj, ame gardataj en la generala domo de ka Klaveraninoj en Via de "L'Olmata" en Romo, ĉe la baziliko S.Maria la Plej Granda, estos ankaŭ por ni esperantistoj,kiuj intencas viziti ilin je la 13a de Aŭgusto, akcelo de kristana fideleco.

ELMONTRO DE MANUSKRIPTOJ kaj inkunabloj apartenantaj al la Apostola Vatikana Biblioteko estis inaŭgurita de la Papo je la 20 de junio. Tiel oni volis memorigi la 5an jarcenton de ekzisto de ĉi tiu glora Biblioteko, kiu estis destinita ne nur por la servo de la Eklezio kaj de la kredo, sed ankaŭ por utilo de ĉiuj studemuloj. Ĝi naskiĝis en junio 1475, per dekreto de papo Siksto 4a, kiu volis efektivigi la deziron de sia antaŭulo Nikolao 5a, kolektinto de valora kaj abunda materialo, kiu de tiu momento ĝis hodiaŭ estis pli kaj pli riĉigita. Fakte unu el la plej famaj rarajoj, kiujn la Biblioteko posedas, estis ĝuste donaco de la reganta Papo Paŭlo 6a. Temas pri la dokumento "Bodmer", papiruso de la 3a jarcento, entenanta du leterojn de la apostolo Petro; dokumento, kiun la malkovrinto mem donacis al la Papo. La tuta elmontro konsistas el 311 tre valoraj dokumentoj, inter la plej rimarkindaj de la Biblioteko.

HO ASTRO PLEJLUMA

Ho Astro plejluma - Itala de l' tero,
Francisko, ni ĝoje - Al vi kun espero
Rigardas, proklamas - Patrono ĉe Di'.

El ĉiuj popoloj - Resonu la kanto
Himnadu laŭtvoĉe - Al vi bonfaranto,
Leviĝu konkorde - La danko de l' kor'.

Heroldo de Dio, - Vi Kriston predikis,
Al kor' de Jesuo - La vojon indikis,
Logante l' animojn - Per vorto de am'.

Al ni mizeruloj - La vorto konsola,
Per kiu la koro - De l' hom' iĝas mola,
Aŭdiĝu denove - Parolo de sav'.

El tiu ĉi tero - Foriĝu malamo
La regno stariĝu - De l' Kristo la amo,
El kiu ekfloros - Kaj paco kaj bon'.

Revenu, Francisko: - Sub via standardo
Tra l' monda batalo - Luktante kun ardo
La savon ni trovos - Marŝante kun vi.

KUNVENO EN ROMO pri la Slovaka kulturo. Inter la multaj naciaj pilgrimadoj, kiuj viciĝas en ĉi tiu periodo en la Romo de la Sankta Jaro, apartan atenton altiris tiu de la Slovakoj disiĝintaj tra la mondo. Kiel estas konate, triono de la slovaka popolo, vivas, kaŭze de amaselmigradoj ekde la mezo de la pasinta jarcento ĝis nun, disigita tra la plej diversaj landoj de la mondo, ĉefe en Usono kaj en Kanado.
Fidelaj al siaj tre antikvaj naciaj tradicioj, kiuj kunligas intime ilian kulturon al la katolika religio - fakte estis la sanktaj Cirilo kaj Metodio kiuj, kune kun la evangelia predikado donis bazojn al la slovaka literatura civilizo, enkondukante en la landon la alfabetan skribon - la Slovakoj alkuris pilgrime multnombre al Romo por partopreni kolektive en la celebradoj de la Sankta Jaro.
Ĉi tiu de 18-22 junio estis sendube la plej reprezenta slovaka pilgrimado. Partoprenis en ĝi preskaŭ 500 personoj el ĉiuj kontinentoj, inkluzive de la malproksima Aŭstralio, reprezentantaj 51 religiajn kaj kulturajn slovakajn organizojn en la mondo. Malfermiĝinte per partopreno en la Papa Aŭdienco je 18 de junio, la pilgrimado konkludiĝis je 22 de la sama monato per solena kuncelebrado laŭ la orienta slava rito en la Bazilikoj S. Maria la Plej Granda.
En la ampleksa kadro de la programo de ĉi tiu slovaka pilgrimado, disvolviĝis, sub patroneco de la Tutmonda Slovaka Kongreso kaj direktita de prof. Jozef M. Kirschbaum el Toronto, scienca kunveno pri la slovaka kulturo. Multenombra grupo da slovakaj kleruloj, loĝantaj en la plej diversaj landoj de la mondo, renkontiĝis en Romo por kune pritrakti historian sintezon de la kultura disvolviĝo de la slovaka popolo. La kunveno estis malfermita en "Grand Ball Room" de la hotelo Cavalieri Hilton sur Mario-monteto per enkonduka paro-

lado de P.A.Morlion, prezidanto de la Internacia Universitato "Pro Deo", sekvata de fervora alvoko de prof. Leo Magnino, el la Ministerio de la Kulturaj Aferoj. Estis legitaj aŭ anoncitaj kunsentoj de institucioj kaj aŭtoritatoj el la itala kultura mondo kaj el multaj aliaj landoj.

La unua tago de la kunveno estis dediĉita al la kultur-historiaj originoj de la slovaka popolo. Prof. Jaroslav Pelikan, dekano de la Filozofia Sektoro de Yale University en Usono, parolis pri la signifo de Kristanismo en la slovaka historio, dum prof. Jozef Cincik ekzamenis la rilatojn inter la rom-itala kaj la antikva slovaka civilizo. La tre grava periodo de la imperio de la Granda Moravio, laŭ la lumo de la plej freŝaj malkovroj, estis objekto de la lekcio de prof. Mikelo Lacko, el la Orienta Pontifika Instituto. Pri la kultura evoluo de la Slovakoj en rilato al la Hungara regno diskutis d.ro Alvéd Grébert, el Ĝenevo kaj prof. Teodorik Zubek, el Usono. Konkludis ĉi tiun unuan tagon raporto de D.ro Jozef Spetko, el Munkeno, pri la evoluo de la sciencoj en Slovakio.

La kunveno daŭris je la sekva tago en la du vastaj salonoj de Cavalieri Hilton. Al la progreso de la eklezia organizo en Slovakio kaj al la rolo de la eklezioj en la kultura disvolviĝo de la Slovakoj dediĉis siajn kontribuaĵojn mons. Jozef Tomko, Subsekretario de la S.Kongregacio pri Episkopoj, Respektinda Dusan Toth, por la protestanta eklezio kaj prof. Daniel Faltin, OFM konv., vicdekano de la Fakultato pri Kanona Juro el la Pontifika Laterana Universitato. Sintezan rigardon pri la evoluo de muziko en Slovakio donis per siaj referaĵoj prof.inoj Viera kaj Eva Pleskova, el la German - lingva Svisujo. La kultura aktiveco de la Slovakoj en la mondo estis ekzamenita de prof. Michel Novak el la Rockefeller Fondation en Usono, kaj de prof. Jozef M.

Rydlo el Liceo Pareto de Laŭzano. La akademia pentristo Tibor Kovalik referis pri la disvolviĝo de la slovakaj figuraj artoj, dum pri la slovaka kulturo de la 19a jarcento dediĉis sian studon prof. Stefan Glejdura, el la Madrida Universitato. D.ro Imrich Kruzliak, el Munkeno parolis pri orientiĝoj en la slovaka moderna literaturo. Fine, kiel omaĝonal la sidejo de la kunveno, prof. Milan S.Durica, el la Padova Universitato, prezentis pririgardon de la kulturaj rilatoj inter Italujo kaj Slovakio en la arko de la tuta periodo de la moderna epoko.

Entute la Kunveno donis al siaj multenombraj partoprenantoj tutvidaĵon sufiĉe kompletan de la historia evoluo de la slovaka kulturo, riĉigita per novaj kontribuaĵoj tre gravaj, kiuj stimulos - oni povas tion esperi - pluajn priserĉadojn en ĉi tiu sektoro ĝis nun malmulte prizorgita de la scienca esplorado. Kiel dominanton oni povis konstati, tre evidentan, la orientigan ĉeeston de la ideo, spirita heredaĵo cirila-metodia, kaj unu el la esencaj principoj de la slovaka kulturo, al kiu ankaŭ la nuntempaj slovakoj atribuas apartan gravecon. Tion klare montris ankaŭ la nuna tutnacia pilgrimado al Romo, per ĉiuj siaj programaj artikoj laŭ religia kaj kultura karaktero.

Kun bedaŭro ni informas, ke nia fidela UECI-ano Giovanni BRUNO, d.ro pri beletro, forpasis la 27-an de junio. Al lia funebranta familio kaj al la Esperanto-Grupo de Catania, kiu havis lin de longe aktiva prezidanto niajn plejkorajn esprimojn de religia kondolenco.